BEKKURSO DE ESPERANTO--BEKUNU
VERKITA DE DENNIS E. KEEFE, 1987
PLIBONIGITA 1994
Ĉiuj Rajtoj Rezervitaj

Praktiku en grupoj la sekvantan dialogon. Ripetu ĝin. Uzu vian nomon!

Johano: Bonan matenon.
Maria: Bonan matenon.

Johano: Kiel vi nomiĝas?
Maria: Mi nomiĝas Maria. Kaj vi?

Johano: Mi estas Johano. Kiel vi fartas, Maria?
Maria: Mi fartas bone, dankon. Kaj vi?

Johano: Ankaŭ mi fartas bone, dankon. Ĝis la revido, Maria.
Maria: Ĝis la revido, Johano.

Prinotu la pronomojn

mi	ni
vi	vi
li	ili
ŝi	
ĝi	

Prinotu la frazojn

Mi fartas tre tre bone.
Mi fartas tre bone.
Mi fartas bone.
Mi fartas mezbone.
Mi fartas malbone.
Mi fartas tre malbone.
Mi fartas tre, tre malbone.

Prinotu la frazojn

Bonan matenon.
Bonan tagon.
Bonan posttagmezon.
Bonan vesperon.
Bonan nokton.